

# LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-  
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE  
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HEL-  
SING, Gävle. Adreso por korespondado: Gävle.  
Ansvarig utgivare — responda eldonanto kaj  
administranto: W. WAHLUND, Gävle, (Svedujo).

N:o 9.  
September 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige  
1:20 kr., i Norge 1:60 kr., eksterlande 1:— Sm.  
(1:82 kr.).  
Lösnummer 10 öre.  
Annonspris — anonprezo: 5 öre pr mm.

## Al la legantoj.

Per tiu ĉi numero de »La Espero» subskribinto finas sian laboron kiel redaktanton de la gazeto, transdonante ĝin al nia federacia prezidanto, sinjoro J. Lundgren en Hedemora.

En la firma deziro voli fari ion por nia lingvo mi jam antaŭ preskaŭ tri jarojn prenis sur min tiun laboron, kies amplekson kaj signifon mi tiam apenaŭ komprenis kaj por kiu mi tute ne estis kompetenta. Se mi tamen sukcesis iagrade plenumi la laboron, mi por tio unue ŝuldas dankon al tiuj malnovaj esperantistoj, kiuj afable helpis min. Kaj sennombraj signoj de tiu solidarco, kiun donas la intereso kaj entuziasmo por la komuna celo, faciligis la laboron, instigante al novaj penoj kaj klopodoj.

Kiam mi nun pro la cirkonstancoj — la militekzercado — devas transdoni la redaktorecon al alia, mi tion faras en la ĝoja konscio, ke nia gazeto per tio ankaŭ venas en la manojn de pli kompetenta persono. S-ro Lundgren ne bezonas ian rekomendon; kiel redaktoro de la sveda parto de »Dana Esperantisto», poste de »Sveda Esperantisto» kaj kiel kunlaboranto en »La Espero», li estas bonkonata al la svedaj esperantistoj. Je sia flanko li ricevis s-ron J. Helsing en Gävle, kiu prenis sur sin sian ŝarĝon de la laboro.

Esprimante al la legantoj, kaj precipe ĉiuj kunlaborantoj, sinceran dankon, mi esperas, ke »La Espero» ĉiam iru sukcese antaŭen, kiel la ĉefa rimedo en la batalo por la venko de la *lingvo internacia* en la Nordo.

R. Pehrsson.

## ”Hela Esperanto”

genom att läsa en liten saga.  
Pris 10 öre.

Det låter ju verkligen som en liten saga, att ett verkligt språk, ett levande språk med mångsidig användning, skulle kunna inhämtas med så föga möda — och för en så ringa kostnad. Ingen lärar väl heller uppfatta detta som bokstavlig sanning. Obestriddig sanning är visserligen, att man på angivet sätt kan lära ganska mycket av Esperanto, men i det stora hela må man öppet erkänna, att förespeglarna om en sådan fabelaktig lätthet egentligen tillhöra en numerärförfluten period av esperantos historia. Esperanto hade på den tiden alls icke nåttsamma utbredning och användning, som i vår tid; därför ej heller samma utveckling, och »hela» Esperanto var således mycket mindre omfattande, än vad förhållandet är numera. Därtill kom, att åtskilliga bland den tidens esperantopropagandister, med all respekt sagt, ej besvärades av någon som helst tvekan, då det gällde lovtal över Esperanto. Praktisk användning i någon nämnvärdare omfattning hade Esperanto då för tiden näppeligen nått, och då man ville framhålla språkets fördelar, tillgrepos de enda argument, som man kände. Därvid kom naturligtvis språkets lättlärdhet i ett av de främsta rummen — i all synnerhet som de, vilka mest överdrevo denna lätthet, själva ägnat endast otillräckligt studium åt språket. Man upphörde helt enkelt med sina studier på ett allt för tidigt stadium,

d. v. s. då man trodde sig ej ha mera att lära.

Att Esperanto är många gånger lättare att lära, än vilket som helst annat språk, betyder icke att man på några få veckor skulle kunna erinä fullt herravälde över dess användning i tal och skrift. Men möjlighet att lära sig »hela Esperanto» finns likvisst, och det är mera än man kan säga om något annat språk.

För att lära sig att någorlunda nöjaktigt använda Esperanto, är emellertid en jämförelsevis kort tid tillräcklig, naturligtvis beroende på intresse och disponibel tid. I allmänhet torde ungefär ett halvår vara tillräckligt, under förutsättning av temligen energiskt bedrivna studier. Man kan säga om esperanto, som om schackspelet och om all annan konst: att lära sig grunderna är mycket lätt — men därutöver finnes ännu mycket kvar att lära.

Allt detta är icke skrivet för att avskräcka någon från att börja lära Esperanto — om lust därför finns, så är Esperantostudiet både nyttigt och nöjsamt. Men syftet är att framhålla, att Esperanto alls icke är ett sådant skräpspråk, som man skulle kunna lära från början till slut på fjorton dagar. Det mellanfolkliga hjälpspråket *måste* vara åtskilligt svårare än så, för att kunna duga som enda språk för allvarligt tankeutbyte om vilket som helst ämne. För att *kunna* Esperanto är det icke nog med att man själv tror sig förstå vad man säger eller skriver; därtill fordras också att man kan uttrycka sig så, att andra personer förstå vad man meddelar, och på samma gång att man förstår vad en annan person säger — d. v. s. då Esperanto talas korrekt.

Att språket skulle vara till för att dölja tankarna, är en regel som ej bör gälla i fråga om Esperanto.

*Jln.*

## S. E. F.

Inbetalda årsavgifter för åren 1914 och 1915:

Stockholms Esperantoförening för en medlem.

Winberg, Carl, Bengtsfors.

» Hedvig, »

Kvitteras Gefle den 25/9 1915.

*J. Helsing.*

Kassör.



## La Esperos garanti-fond.

Tecknade andelar:

Trpt. 410:—

Carl Winberg, Bengtsfors 15:—

Summa Kr. 425:—

Gävle den 20/9 1915.

*Gävle Esperantoförening.*



## Esperanto vid svensk-finska gränsen.

Nu rådande förhållanden hava gjort att många svenskar från mellersta Sverige blivit transporterade till norra Sverige för militärtjänstgöring. Detta är oftast alldeles oförberedade resor. Personer, som man rekommenderat lärandet av esperanto och som velat hålla för givet, att de alltid komma att stanna på en och samma plats och därför icke kunna ha någon användning av esperanto, ha under nuvarande förhållanden blivit överbevisade om ohållbarheten i sina principer att alltid säga »aldrig» till saker och händelser, som för tillfället synas dem omöjliga.

Så ha en hel del kamrater och vänner till undertecknad blivit sända till det nordligaste Sverge. Två ynglingar, för vilka jag förut

framhållit nyttan av kunskapen i esperanto, resonerade förut på ungefär ovannämnda sätt. Nu ha de återkommit och omtala med stort intresse, att de vid tvenne tillfällen blivit tilltalade av ryssar, som de träffat vid ett besök på andra sidan gränsen, på esperanto, men icke lyckats göra sig förstådda, varigenom de utan tvivel fått försaka tvenne trevliga och gemytliga sammanträffanden.

Nu senast i augusti har en annan god vän till mig blivit sänd dit upp. Vid flera tillfällen har han lovat lära sig esperanto. Mycket strängt upptagen som han är, har dock dessa studier fått giva vika för andra saker. Han har en gång förut på resa mellan Gefle och Stockholm blivit överrumplad av en tysk esperantist, som märkte att han läste »La espero». Han beklagade då i ett brev, att han icke lärt sig språket. Nu beklagar han också i ett brev, att ett tillfälle gått honom förbi. Han skriver bl. a. —» — — — I fråga om språk kan jag nämna dig att jag råkat på en esperantist — dam — inne på ett konditori i Haparanda. Hon hade suttit där länge och tilltalat än den ena och än den andra på tyska, engelska och esperanto och sitt modersmål, polska. Men ingen hade kunnat förstå henne. Och jag beklagar verkligen att jag icke kunde esperanto tillräckligt». — —

Detta bör vara tillräckligt att bevisa för vem som helst, att de utan egen förskyllan och värdighet, när som helst kunna komma i en situation, då kunskap i esperanto kräves. Icke nog med att man då, i fall man icke kan esperanto, själv får försaka det nöje, som samvaron med »samideaner» alltid erbjuder, utan man är även ur stånd att kunna hjälpa en medmänniska i en bryd-sam situation.

*E. A.*



## La packongreso de la virinoj en Haag,

Aprilo 1915.

De B. J-hss Klingenberg.

I.

(Daŭr.)

La frazo pri la »internacia premo kontraŭ la militantaj ŝtatoj» malkaŝas anarĥian inklinemecon kaj

montras al bojkoto aŭ linĉo, — metodoj kiuj tute verŝajne estos realigataj per pagita gazetaro kondukota per sekretaj konduksindikatoj. Ni preferos organizi tute malferme laborantaj internaciajn instituciojn elirintajn el la kolekto de tiuj burĝoj, kiuj estas pagintaj la pacimposton. Tiuj instancoj formas en natura maniero senpartiajn tribunalojn, antaŭ kiuj la partioj povas pledi siajn interesojn kaj ricevi juĝon pri la justeco. La oportuna politiko sin ordigus tute nature laŭ tiu ĉi fundamento.

La virinoj diras:

»Tiam la kombinita potenco de la virinoj el ĉiuj landoj devas esti supozita kiel unu el la plej fortikaj fortoj por malhelpi militon...»  
Ĉu jes?

La kulturhistorio de la homaro montris la virinojn kiel grandajn reĝinojn, diplomatojn, generalojn kaj ankaŭ furiozajn batalantinojn, sed ne estas konata al mi, ke la historio liverus eldirojn, laŭ kiuj estas eble antaŭmeti la jus nomitan supozon. Mi ne insistos, ke oni ne povas pensi la eblecon de tiu ĉi antaŭgardanta potenco, sed tiu kondiĉo tiajn fortege sociajn renversigojn, ke tiuj ĉi ne povas esti realigataj dum superrigardebla estonteco. La supozo mem estas de dubega praveco.

Kompreneble la laboro por la interpopola paco havos specialajn taskojn por kiuj la kunlaborado de la virinoj estas kaj dezirinda kaj necesa.

Mi nomas ekzemple:

1. Ĉu estas eble ebenigi la malfacilaĵojn de la ekspansia politiko per la ordigo de masa emigracio de virinoj kaj estus tiu ĉi eble necesa kaj dezirinda dum la nuntempaj rilatoj en Eŭropa?

2. Kiujn rimedojn ni havas por solvi la pramaljunan, ankoraŭ ne solvitan demandon pri la disvastigo sur la plej granda nombro de virinoj de sufiĉaj naskoj de infanoj necesaj por la prospero de la popolo?

3. Kiun rolon ludas la vira devo de la subteno por la familio rilate al la ebleco konservi la interpopolan pacon kaj kiujn sociajn (nepolitikajn) rimedojn havas la virinoj por malsarĝi la malfacilaĵojn de la subteno?

4 & 5. Ĉu estas solveblaj la malfacilaĵoj, kiuj devenas el la demando de la raso kaj koloro?

Jen mi staras nur kaptinta kelkajn, tute malmultajn demandojn,

kiuj montras senpere al rilatoj de kiuj la interpopola paco grandege dependas.

Estas evidente, ke la ordigo por subteni la interpopolan pacon tute ne povas esti prokrastata ĝis la deziritaj, politikaj rajtoj por la virinoj estos realigitaj en la ŝtatoj.

Kiam ili antaŭmetas tian proponon ili reale nur eldiras sian indiferentecon por pozitiva laborado por la interpopola paco. Rilate al tiu ĉi ne estas necesa la rapidega, sociapolitika liberigo de la virinoj, sed absolute ilia spirita liberigo kaj la evoluciigo de ilia povo por logike pensi pri la antaŭpaŝanta vivo de la sociaj rilatoj.

La praveco de tiu pretendo estas donita per la altiĝanta ondo de la kongresaj rezolucioj.

Fraŭlino Rozika Schwimmer estis sendube grandioza retoristino, kiam ŝi buŝe priskribis la virinajn dolorindigojn pri la buĉadoj de la milito, — sed ni konsilas al tiu bonparolanta virino, ke ŝi en la estonteco evitu, ke la profunda sento, kiun ŝi povus krei, per mallertaj rezoluciistinoj estis uzota por okazigi akceptadon de tia malespera eldiro kiel la jena.

La virinoj diras nome:

»Kiam neniu el la militantaj popoloj opinias sin fari atakan militon, sed nur opinias fari militon por la defendo de sia nacia ekzistado, tiam inter ili nenia nepardonema malkonsento povas ĉeesti kaj tial aliaj komunaj idealoj devas esti kapablaj por krei fundamenton por grandintensa kaj honorplena paco, kiu povus esti aranĝita baldaŭ.»

»La komunaj idealoj de la militantaj partioj!? Hm!

Analizu zorge tiun frazon!

Rememoru, ke la situacio estas tiu, ke ni dum homvivdaŭrojn estis preparintaj revenĝ-kaj mortigpolitikon, kaj ke ni nun estas meze de kruela milito, kies fino montros al ni, ĉu la homaro estonte estos benata per germana militarismo aŭ per angla ŝipmilitarismo kaj franca kaj rusa militarismo.

Ĉu dum tiuj ĉi cirkonstancoj la plej altaj pensoj, kiuj entute povas esti pensataj pri io, kio estas tute fremda por la viva realeco, havus ian povon formi la fundamenton sur kiu oni povas aranĝi daŭran, honorplenan pacon?

Ne taŭgas idealoj kontraŭ la mankantaj bezonoj de la grandaj

masoj, kiam tiuj ĉi interbatalas dum malsato kaj morto — batalo kaŭzita per la fakto, ke egalpezo de la vivantaj kulturoj estas postvivinta sin mem.

La interpopola politiko devas ekskluzive labori per la plej akraj realaĵoj. Se la milito iam komenciĝis, tiam ĝi ne povas reale ĉesi, antaŭ ol de unu partio da regantaj potenculoj kiel perdanta partio kun ĝia tuta apartenaĵo estas deprenita la povo de iu estonta revenĝpolitiko, — ja eĉ tiagrade, ke tiu ĉi partio apenaŭ en la estonteco povus realigi ian valoran kulturagon.

Kiam nun la evolucio estas kondukinta la realan vivon al tiuj ĉi rilatoj post nia travivado de multaj, unu post alia proksime viĉigitaj militoj, kiel estos do eble ke 2000 lertaj, bonedukitaj kaj pacemaj virinoj povas doni al siaj profunde sentataj pacpretendoj tian sensencan formon, kiun oni devas karakterizi kiel senpripensega, kiam la postulo estas antaŭmetata sub sento solenfarita per mortstertoro el la sangvaporantaj batalkampoj de Eŭropa?

Laŭ mia opinio ne estas malfacile doni respondon al tiu demando.

Mi preterlasas dume doni tiun, tial ke la reala vero, kiam tiu ĉi eltroviĝos unuope de la virino mem, por ŝi estos neforgesebla etesto pri tiu ĝoja fakto, ke la koncernantino ekkomencos esti spirite vekita pri la kompreno de Dio de la eterneco, tiamaniere kiel la grandegaj naturfortoj en la vivanta karno kaj sango de la homaro sin ekkonatigos, kiam oni ne plenumos al ĝi la necesajn vivbezonojn.

Per la malpleniĝo de tiu verkaliko la virinoj akiros pli naturan komprenon pri la pensmaniero kaj vivo de la homaro. Tiu ĉi kono estas nepre necesa, ĉar la kulto de la interpopola paco kun siaj reformantaj konsekvencoj ne povas esti prospera per sensenca knabinetpolitiko.

En la daŭrigo mi raportos pri la bonfarantaj lumpunktoj de la kongreso.



## Libroj kaj gazetoj.

Foiro de Valencio 1915. Oficiala Programo de la festoj organizitaj de la Moŝta Urbeŝtaro por la

tagoj 22-a de Julio ĝis 2-a de Aŭgusto.

Belega libreto, atentinda — malgraŭ ĉesinta aktualeco — kiel bona rekomendilo por la firmo »Tipografia relieves Estanislao Machi» (elp. Maĉi), plaza de E. Castelar 5, Valencia. Precipe ĉarmas la kovrilo, ornamita per ruĝaj rubandoj sur orumita fono kiun ĉirkaŭas verda girlando. Bela estas ankaŭ la helblua tagpaĝaro (1 paĝo por ĉiu el la 12 festtagoj), kiu tamen surprizas nin per unu el la okazaj mirindaĵoj de l' mondo: ke la semajno 25—31 de Julio 1915 laŭ hispana kalendaro enhavis du mardojn kaj neniun merkredon. Malpli mirindaj estas la senĉapeligitaj jaŭdoj <sup>22</sup>/<sub>7</sub> kaj <sup>29</sup>/<sub>7</sub> (skribitaj Jaŭdo).

H. B.

**Civitanoj de l' mondo.** De Yervant H. Iskender, fondinto. Tomna Monahan, Pitlochry, Skotlando. 32 p. Esp. W. M. Page. Dediĉita al la altestimata memoro de la Paciganto, Eduardo VIIa.

Ĉarme kaj alloge verkita pacpropagandilo, cetere trateksita per bibliaj citaĵoj por esprimi la firman konvinkon de l' aŭtoro ke »la pacmovado estas esence kristana» (komprenoble! kia ĝi alie estus?). La kvintesencon de la libro eble plej klare donas la jenaj vortoj (p. 22): »La Milito ja estas pli ol freneza stultajo. Ĝi estas antaŭpripensita krimo, la laboro de »blindaj kondukantoj de blinduloj», elfarita per egoismaj celoj en la nomo de nacieco, religio, diplomatio, strategio, aŭ kulturo.» Precipe kontraŭ la ideo de l' nacieco la aŭtoro fervore probatalas kaj la ideon de la personeco kaj tiun de »tuthoma unueco». La libro, havebla senpage, estas tradukota en multajn lingvojn.

H. B.

**Internacia Bulteno.** Germana informilo pri la milito. Eldonejo: Deutscher Esperanto-Dienst, Berlin S. 59. Sur la titolpaĝo oni presis germane, angle, france, itale kaj hispane jenan avizon: Por eviti eldonadon en pluraj lingvoj, tiu ĉi ĵurnalo estas publikigata nur en la neŭtrala universala helplingvo Esperanto. Tradukistoj por tiu lingvo troviĝas en ĉiu pligrava loko en civilizitaj landoj.



Bär Esperantostjärnan!



### Stor-Britannien.

Vid handelskammarens i London esperantoexamina detta år ha utdelats 24 diplom bland deltagarna samt 3 lärarediplom.

Britiska esperantister ha nu skänkt en *andra* ambulansautomobil till belgiska Röda Korset.

Skotska esperantoförbundets årskongress ägde rum i Hamilton den 19 juni.

### Nordamerika.

Esperantokurser hava hållits för vägvisare och vaktmanskap vid världsutställningen i San-Francisco. — Utställningsbestyrelsen har låtit utgiva en särskild resehandbok på Esperanto.

Programmet för sommarkurserna vid Utahs universitet i Salt Lake City har bland andra ämnen upptagit Esperanto.

### Spanien.

Kataloniska esperantoförbundet har i Barcelona upprättat ett esperantohem, öppet för varje esperantist.

### Österrike-Ungern.

Utgivandet av tidningen »German-Austria Esperantisto», och likaledes av de böhmiska esperantotidningarna, har måst avbrytas på grund av nu rådande förhållanden. Emellertid hållas kurser i några städer, och artiklar om Esperanto förekomma ofta i böhmiska tidningar. I Ungern utkommer fortfarande tidningen »Verda Standardo».

### Ryssland.

I fånglägret i Kazan har anordnats en esperantokurs under ledning av en österrikisk esperantist. Kurser och sammanträden i övrigt äga rum flerstädes. Vid realläroverket i Astrakan har bildats en esperantocirkel bland lärjungarna.

### Holland.

I det belgiska interneringslägret vid Harderwijk har en ny esperantokurs, den tredje i ordningen, tagit sin början med 70 elever.

### Schweiz.

Esperantokurser på flera platser, bland annat i Chaux-de-Fonds med stort antal deltagare.

Omfattningen av Universala Esperanto-Asocios verksamhet under

krigstid kan någorlunda uppskattas efter antalet mottagna och avsända postförsändelser vid centralbyrån i Genève. Från och med november 1914 till slutet av maj 1915 har antalet uppgått till 71,652.

### Frankrike.

Vid ett av de vid krigsutbrottet bildade främlingsregementena har anordnats en esperantokurs med synnerligen gott resultat. Där, bland medlemmar av en mangd nationer, är Esperanto just vad som behövs.

På många platser vid krigsfronterna hållas esperantokurser i skyttegravarna.

Kurser i övrigt flerstädes, bland annat i Château-Thierry för 23 elever vid högre läroverket för flickor.



## Esperantister:



Rudolf Pehrsson,

vars drag vi härovan ha nöjet presentera, avgår fr. o. m. detta nummer som »La Esperos» redaktör. Detta på grund av värnplikten, som i november detta år kallar honom.

Pehrsson har alltsedan sitt inträde i esperanto-rörelsen år 1910, varit en av rörelsens bästa och mest uppskattade krafter. Han har under en följd av år varit Gävle Esperantoförenings pliktrogne sekreterare och en medlem, som aldrig fattats på mötena. Som redaktör för »La Espero», vilken befattning han innehåft sedan årsskiftet 1912—1913, har han nedlagt ett drygt och självupoffrande arbete för den

svenska esperantorörelsen. Lugn och sansad som han är och omtyckt av oss alla, har han åtnjutit en hel del andra förtroendeuppdrag; bl. a. var han Gävleförningens ombud vid esperantodagarna i Norrköping, sekr. i S. E. F:s verkställande utskott, m. m.

Då Pehrsson nu reser till sin garnison för att där tillbringa ett år, så förstå alla att Gävle Esperantoförening för en tid kommer att sakna en av sina duktigaste och mest uppskattade medlemmar. Men hoppas vi att han även på den plats, där han nu kommer att vistas, skall vara till gagn för vår rörelse.

Basta kamrat! Med dessa rader som ett uttalande av den tacksamhet, med vilken esperantisterna Sverige runt mottagit ditt arbete under de gångna åren, är det mig ett stort nöje att få önska dig en god fortsättning, med hopp om att även efter det du återkommit i det civila få konstatera din hjälp i arbetet för vårt kära språk.

Einar Adamson.



## En Svedujo.

Fino Josefino Finholt el Kristiniano restis ĉe Striberg proksime de Örebro parton de sia libertempo en la pasinta somero, kaj propagandis tie Esperanton tiel sukcese, ke 11 personoj fervore partoprenis ŝian kurson, kiu daŭris tri semajnojn kun du lekcioj ĉiutage. Ni ĝojas pro la vizito de Fraŭlino. F., kaj dezirus por la bono de nia kara afero, ke ŝi ne estus reirinta sian hejmlandon, sed restonta en Svedujo por daŭrigi sukcesriĉan agadon.

\* \* \*

Pastro Alb. Wickman, la generalo de la Blanka Armeo, skribis: »Nun mi komencis studi Esperanton, kaj tio sukcesas bonege, ĝi estas bona lingvo kaj mi tute fidus al ĝi. . . . kaj estos supozeble tiu, kiun ni akceptos.

En tiu malgranda organizaĵo interne de nia movado, kiun ni nomas »la Blanka korpuso», ĉiu membro aŭ soldato devos lerni tiun lingvon, kiun ni akceptos.»

. . . Estas laŭ propono el Anglujo, ke W. lernas Esperanton, por poste enkonduki la lingvon en »la Blanka korpuso».

## La paliskonstruaĵoj en Svisujo.

El artikolo en »Reclams Universum».

### I.

En la komenciĝo de jaro 1854 la akvo en la svisaj lagoj estis tre malalta kaŭze de neordinare malvarma kaj seka vintro. Eĉ la plej famaj »plej maljunaj personoj» ne povis rememori egalan malaltecon de la lagnivelo. Post 1674 la akvo mezurpaliso registris neniun egalan malleviĝon. Ĝie antaŭ la bordoj aperis la nuda lagfundo, la ŝipkomunikado estis malhelpita kaj la mueloj devigitaj je nevola ripozado. La bordloĝantoj dume utiligis la malutilon, prenante por daŭra posedo tiun seklandon, kiun la akvo tiel malokupis.

Ĉe tiu laborado en Zuriĥa lago oni trovis proksime de Obermeilen torfspecan nigran fundtavolon de konsiderinda dikeco, kiu, krom supozitaj restaĵoj de vegetaĵoj kaj granda nombro da avelŝeloj, enhavis diversajn objektojn el ŝtono, korno kaj ostoj; tie troviĝis ankaŭ multe da rimarkeble ordvice starantaj ŝtupoj el kverka, faga, betula kaj abia ligno, kiuj vertikale penetris malsupren en la fundo. Similaj trovitaĵoj estis jam plifruer rimarkitaj de fiŝkaptistoj aliloke; tiam oni tamen ne esploris la aferon. Oni supozis, ke estas restaĵoj de pereintaj ŝipoj aŭ hazardokazaj amasiĝoj — plua esploro do ne donus rekompencan. Tiun ĉi fojon la okazo tamen estis aŭdata de instruisto en Obermeilen, Johannes Äppli, kiŭ estis sufiĉe pripensema por informi la antikvistan societaton en Genève pri sia ekseco, alsendante kelke da specimenoj el la trovitaĵo. La prezidanto de la societo, la pens-  
trafema antikvisto D:ro Ferdinand Keller, rapidis sekvi la atentigon de Äppli, kaj — unu el la plej gravaj sciencaj eltrovoj estis farita en la fako de la homara prahistorio!

Neniu ŝipo pereis ĉe Obermeilen; neniun hazardon metis kornobjektojn, formitajn ŝtonojn kaj argilajn rompaĵojn sur la fundon de Zuriĥ-lago; kontraŭe kun plena dezirinda evidenco oni sciigis, »ke grupoj da familioj, tre verŝajne keltdevenaj, kiuj vivadis per fiŝkaptado kaj ĉasado, kaj tamen ne estis tute senkapablaj pri kampkulturado, en tre frua epoko loĝis ĉe la randoj de svisaj lagoj, en budoj kiujn ili ne

konstruis sur seka fundo, sed sur palisoj ĉe malprofundaj bordoj». Verŝajne estas supozeble kun certeco, diris la unua raporto de Keller, ke la speciala maniero de la loĝigado ne apartenis nur al la svisaj regionoj, kaj tial li petis al ĉiuj antikvaj esploristoj loĝantaj proksime de lagoj aŭ malrapide fluantaj riveroj, ke ili informigu ĉe fiŝistoj kaj ŝipistoj pri troviĝado de palisaroj apud bordoj kaj sur malprofundaj, kaj entreprenu bezonan notadon — kaj tiu ĉi apelo rezultis kun neatendita sukceso. El ĉiuj partoj de Svisujo alvenis informoj unu post alia, kaj jam en 1866 oni sciis pri pli ol 200 paliskonstruaj lokoj en la plej multaj el la grandaj kaj en multaj malpli grandaj lagoj de la lando. Nur en Novkastela lago troviĝis 50, en Bodenlago 40, en Biel-lago pli ol 20. Unu el la plej grandaj loĝlokoj kun pli ol 100,000 palisoj havas la malgranda Pfäffik-lago; unu granda kun proksimume 40,000 palisoj troviĝas en Bodenlago proksime de Wangen. Kaj post tiam la nombro de la trovitaĵoj estiĝis ankoraŭ plimulte granda.

Nova mondo estis ekkonita; la kurteno leviĝis antaŭ grava parto de la granda spektaklo de la homara historio. »Kvazaŭ ordigitaj en libraro», laŭ la esprimo de Ranke, la sciaĵoj pri la frutempo kuŝis tavoloorde en la restaĵoj de la paliskonstruoj. Laŭ kontinua ordo la evoluo de la homoj klariĝis tie ĉi, komence de ŝtonhakile armita ĉasisto de la diluvia epoko, ĝis militistoj kun arte fanditaj bronzglaŭvoj kaj eĉ feraj armiloj. La tuta antaŭhistoria kulturevoluo kun ĉiuj ĝiaj ŝanĝoj klare kiel printempa mateno aperis el la akvoj ĉe la limo de la alpreĝiono.



## Esperantistaj hejmoj.

La tutmonda esperantista familio, kvankam ĝi plejparte konsistas el laboruloj, kiuj malfacile prilaboras sian ĉiutagan vivon (aŭ eble ĝuste pro tio), bezonas siajn proprajn ripozejojn, refreŝigejojn, sanigajn kaj plifortigajn loĝlokojn. Certe ĉiu persono, bezonanta ripozon kaj restariĝon de fortoj post longedaŭra laboro, trovos en sia proksima ĉirkaŭaĵo tiajn lokojn, sed la gustoj kaj la vivpostuloj estas malsamaj ĉe

diversaj homoj. Unu persono ripozas, anstataŭigante sian kutiman laboron per alia, ofte eĉ pli malfacila okupo; la alia bezonas plenan muskolan kvieton, absolutan senlaborecon, la tria refreŝiĝas per ŝanĝo de ĉirkaŭantaj kondiĉoj, per veturado, precipe river-kaj marveturado; aliaj regajnas siajn fortojn per marbano, sunbano k. t. p.

La afero estas iom alia ĉe esperantistoj: vojaĝante, serĉante por si ripozejojn, ili ofte celas havigi al si bonan esperantan hejmon, amikan rondon. Ĉar tiaj »rondoj familiaj» estas ne ĉiuloke troveblaj, ni devas ĉiam kolekti sciigojn pri tiaj hejmoj, ni devas ilin registri, priskribi en esperantaj gazetoj, tiel same, kiel ĉiuj plej bonaj komunaj someraj refreŝigejoj kaj ripozejoj estas ĉiam, almenaŭ printempe, priskribataj en komuna gazetaro. La specialaj klimat-kaj kuraĉlokoj certe devas esti pritraktataj de specialistoj, en scienca gazetaro, t. e. de kuracistoj en la medicina ĵurnalo »Kuracisto». La T. E. K. A. nun projektas tian registradon de specialaj sciigoj pri klimat-kaj kuraĉlokoj, kie ĉiu esperantisto povas ricevi samideanan kuracadon, flegadon, loĝejan kaj nutran prizorgadon. Publikigado de koncernaj artikoloj en komuna esperantista gazetaro multe progresigus la aferon kaj ekinteresus ne nur la »uzontojn» de tiaj hejmoj, sed ankaŭ la »proponontojn», el kiuj multaj eble mem anoncus pri sia ekzistado.

Pri tia unuaklasa esperanta hejmo en Anglujo mi dezirus atentigi la legantojn de la »Ondo» laŭ propra sperto.

Okaze de la XVII Medicina Kongreso en Londono mi vizitis en la pasinta jaro 4 sudajn apudmarajn anglajn urbojn: Dover, Folkstone, Brighton kaj Ventnor (sur la insulo Wight). Tiuj ĉi lokoj estas belegaj, la tri unuaj sufiĉe luksaj, la kvara pli modesta, ĉiuj estas bonaj banlokoj, kun bona marbordo, kun aranĝoj por agrablaj promenadoj en kaj ekster la urbo, kun pontetoj-albordigejoj por ŝipoj (tiel nomataj »pier»), kie oni povas por kelkaj spesdekoj havi kuŝeĝon kaj ĝui tuttage freŝan surmaran aeron k. t. p. Ĉar mi iom povis interkompreni angle, mi ne maltrankviligis la lokajn delegitojn de U. E. A. por helpo dum vojaĝo, kaj jen evidentiĝis, ke oni sentas sin tie ĉiam fremdulo, kiu hodiaŭ venas, morgaŭ foriras, nenion lasante, nenion kunprenante kun si. La angloj estas tre afablaj

kaj gastamaj mastroj, sed interkonatigo kaj interparolado estas ĉiam iom malfacila pro la teknikaj ecoj de la angla lingvo, en kiu oni skribas »Parizo» kaj elparolas »Londono». Ambaŭflanke oni streĉas sian atenton por »ion» kompreni el tio, kion la alia malrapide penas komprenigi. Pro tio sento de fremdeco neniam forlasas vin. Tamen la angloj, kiel mastroj, kaj Anglujo, kiel gastigejo, faris tiel bonan impreson, ke mi decidis en la nuna jaro pasigi mian tutan libertempon en Anglujo, uzante jam kiel helpilon Esperanton.

En printempo mi interkorespondadis kun kelkaj samideanoj kaj elektis kiel ripozejon Torquay (elparolu Torki) en provinco Devon. Ĉiutune kaj vintre Torquay estas iom luksa laŭmoda loko, somere ĝi estas trankvila, komfortiga, mal-multhoma. La vetero estas varma; multe da sunlumo; bela maro, belaj stratoj kaj domoj, naĝantaj en luksa duontropika verdaĵo: palmarboj, eŭkaliptoj, agavoj, kaktroj kreskas en libera aero. Multaj stratoj estas kovritaj preskaŭ kiel tuneloj, de verda branĉaro, eliranta el duobla ambaŭflanka vico de arboj. Ĉie benkoj por ripozo, ĉie rifuĝejoj kontraŭ okaza pluvo. La urbeto kuŝas sur multaj montetoj, terase malsuprenirantaj al la maro. Bona kombinaĵo de bela kulturoriĉa vilaĝo kun malgranda urbeto, enhavanta multajn bonajn magazenojn, teatron, bonan orkestron, puran havenon, »pier»on, kelkajn grandajn municipalaĵajn parkojn, rondiran tramvojon. La ĉirkaŭaĵoj estas belegaj, kun multnombraj bonaj vojetoj, kun ravaj marvidaĵoj, ĉiam malsamaj, ĉiam karesaj. En tiu ĉi jaro la urbestro komencas konstruadon de speciala marbana kuracejo kun ĉiuj plej novaj apartenaĵoj. Moskvanoj eble kun intereso ekscios, ke la Granda Duko Sergej Aleksandroviĉ loĝis tie ĉi multajn jarojn en malgranda vileto, kiu nomiĝis »Villo Sirakuza» sed nun estas rekonstruita en luksan hotelon »Hydro», kaj la ĉambroj, en kiuj loĝis la Granda Duko (mi ilin vizitis), enhavas nenion rememorajn pri Lia Grand-duka Moŝto.

En la plej suda apudmara parto de tiu urbeto troviĝas esperanta hejmo, plej rekomendinda, plej komforta, rilate malmultekosta (25—40 sm. posemajne por loĝejo kaj plena pensio). En la libro »Travivaĵoj de Ro Ŝo», paĝo 83, estas presita bildo de la anguleto, en kiu troviĝas

la hejmo. La adreso estas jena: 13, Hesketh Crescent, Torquay, Devon, Anglujo. La granda domo havas duonlunan formon, de kio devenas ankaŭ ĝia nomo (crescent = kreskanta luno), kaj konsistas el 15 parceloj, el kiuj du apartenas al la mastrino, samideanino, s-ino Berry. Granda komuna ĝardeno kun du laŭtenisplacoj, kun florbedoj, kun laŭbo por promenadoj dum pluva vetero, kun verdaj herbaj placoj (promenado sur herbo ne estas malpermesata en Anglujo). Belaj ĉambroj, bone meblitaj, kun surmara vidaĵo el la fenestroj, turnitaj suden. La afabla zorgema mastrino kaj la ĉiama loĝanto de la hejmo s-ro R. Sharpe, ekziginta oficisto, kiu sian tutan tempon nun dediĉas al laboro por Esperanto, faros bonan societon por ĉiu esperantisto, kiu ekdeziros konatiĝi kun la provinca angla vivo, pasigi agrablan libertempon, perfektigi sian esperantan stilon en amika interesa interparolado. Kvin semajnojn mi pasigis en Torquay kaj neniam forgesos tiun esperantan familian libertempon. Apartan plezuron faris al ni ĉiuj la speciale aranĝita temanga kunveno de ĉiuj esperantistoj el Torquay (ĉiuj gelernantoj de R. Sharpe), kun du alurbaj gastoj.

Unu tagon antaŭ mia forveturo agrablega surprizo atendis min: mi ricevis de D-ro John Jarvis el Bath afablan leteron, antaŭsciigantan min, ke li kun sia tuta familio renkontos nin en la stacidomo; dum la kunveno mi rakontis al unu el samideaninoj, fraŭlino Lucy Jarvis, ke mi reveturos tra Bath (angla fama kuraĉloko kun antikvaj banejoj el Roma epoko kaj kun novaj luksaj banarangoj) kaj Oxford (antikva universitata urbo); ĉar tiu ĉarma fraŭlino havas fraton, praktikantan kuraciston, en Bath, ŝi skribis al li, ne dirinte al mi eĉ unu vorton, kaj petis, ke li pliagrabilu nian restadon en Bath. Sub lia gvidado mi konatiĝis kun ĉiuj kuracrimedoj kaj ĉefaj vidindaĵoj de tiu originala urbo, tagmanĝis en lia hejmo, pasigis kelkajn ravajn horojn kun lia ĉarma familio. Dankon al ĉiuj!

Esperanto do trovas kaj malfermas amikajn pordojn, kiuj sen tio estus neniel alireblaj...

D-ro M. Nemser.

Petrogrado.

»La Ondo de Esperanto.»



## Esperantoundervisning per korespondens.

En av de viktigaste faktorerna i arbetet för esperantos utbredande är undervisningen i språket. Visserligen kan man vara anhängare av världsspråksidén, utan att kunna ett världsspråk, men deras antal, som äro så vidsynta, är i verkligheten försvinnande litet i jämförelse med den stora massa, som i sin okunnighet endast ha ett medlidamt leende för de i deras ögon fåfänga försöken att upphäva den babyloniska förbistringen. Först kunskapen i esperanto ger möjlighet att förstå och uppskatta dess genialiska enkelhet och härigenom övertygelsen om världsspråksidéns seger.

Under dessa förhållanden är det underligt huru anmärkningsvärt förbisedd denna sida av esperantörörelsen blivit, åtminstone här i landet. Läroböcker finns det visserligen gott om, både små och stora, dyra och billiga och — goda och dåliga. Esperanto är lätt att lära, men man må akta sig för att underskatta svårigheterna. Jag tror, att om man kunde räkna deras antal, som på grund av olämplig lärobok och otillräcklig handledning uppgivit försöket att lära sig det internationella hjälpspråket och därmed kanske också tron på detsamma, så skulle man komma till ett ganska nedslående resultat.

För att i någon mån avhjälpa den brist som här förefinnes, har undertecknad beslutat göra ett försök att på esperanto tillämpa den moderna undervisningsform, som fått namnet »undervisning per korespondens». En sådan kurs ingår visserligen i programmet för det största svenska institutet av detta slag, men den plats, den fått sig anvisad bland alla övriga ämnen, har varit mer än blygsam.

Föreliggande kurs gör icke anspråk på att vara alldeles fullständig; den avser mera att ge en grundlig undervisning än en omfattande, mera en handledning för självstudium än ett inlärande av en mängd torra ord och fraser.

Korespondenssystemets fördelar träda i fråga om esperanto särdeles i dagen; för många isolerade och från någon esperantoförening avlägset boende världsspråksintresserade torde en dylik kurs vara välkommen. Det är också i hopp om,

att kursen skall bliva flitigt anlita och visa sig motsvara förväntningarna, som undertecknad tagit itu med utarbetandet av densamma, och hoppas jag, att alla »samideaner» genom att göra företaget känt bland intresserade giva det sitt stöd.

R. Pehrsson.

Adress: 3—23, Gävle.



## La Heredaĵo de Gustav Vasa.

(El **Novaj svedaj sortoj** de August Strindberg.)

(Daŭr.)

Sed tiu respondis:

— Tie ĉi ne valoras frateco sed pulvo kaj pafiloj.

La skribisto de la reĝo, Nils Rask, venis kuranta kaj petis de Posse kaj Gyllenstjerna »indulgi samlandanojn!» Ĉar tion oni komprenis kiel ordonon de la reĝo, la ambaŭ koloneloj haltis neagante, kio kaŭzis al la duko la venkon; kaj tiel finis la nekomprenbla batalo ĉe Stångebro.

La reĝo nun petis interparolon kun sia onklo kaj kiam tiu konsentis la reĝo rajdis eksteren sur la kampo por renkonti lin. Tiel granda estis la respekto de Karl al reĝeco kaj moŝteco ke li malgraŭ sia maljunaĝo elseliĝis kaj piedire proksimiĝis al la nevo. Sed tiu signis al la duko denove sidiĝi sur la ĉevalo, kaj post tiam ili rajdis eksteren sur la kampo por ke proksimstarantoj nenion aŭdu.

La longa interparolado finis kun la interkonsentiĝo ke oni en Stockholm antaŭ la parlamento kaj la konsilantaro decidu pri la regado de la regno kaj ke la reĝo kaj la duko tie ĉeestu persone. Sed kiam duko Karl krom tio postulis la transdonon de la plej fidelaĵoj de Sigismund, tiu rifuzis, ĉar tia malnobleco ne havis lokon en lia koro. Kiam la onklo tamen ĵuris je la savo de sia animo pri la maldanĝero de tiuj kaj ke »ili estus juĝataj de parlamento en ĉeesto de imperiaj, reĝaj kaj princaj ambasadoroj,» tiuj mem petis esti transdonataj por la trankvilo de la regno. Tiamaniere Erik Sparre, Ture Bjelke, Gustav kaj Sten Banér kaj Göran Posse estis arestitaj, kaj post du

jaroj ili estis juĝataj al la morto en Linköping de juĝejoj, kiu almenaŭ ne estis imperia, kaj kie la filo de Göran Persson estis denuncanto.

\* \* \*

Sigismund daŭrigis la estadon ĉe la kastelo de Linköping, post kiam duko Karl iris Stockholmon, sed lia fratino restis al li. Ĵus alvenis de la duko letero, kiu renversis ĉiujn decidojn de Sigismund, ĉeesti la difinitan parlamentan kunvenon.

— Mi ne povas trakti kun tiu viro, la reĝo ekkriis ĵetante sur la plankon la leteron; li rifuzas redoni la ŝipojn, kiuj ne estas miaj, kaj la rabitajon li retenas, miajn plej bonajn amikojn li enkarcerigas kaj li nomas min malamiko tial ke mi enkondukis fremdajn soldatojn en la landon, kiam mi do responde diras, ke mi ne havas aliajn kaj rimarkas, ke li mem havas eksterlandajn dungitojn, li furioziĝas pro tio ke li estas malprava. Ne, fratino, mi ne estas batalemulo sed homo de paco; plej bone lasi la regnon al li, kiu amas malpacon kaj havas koron el fero...

— Ĉu vi ne iros al Stockholm?

— Ne, mi iras hejmen al la miaj, al mia lando, kie oni parolas la lingvon de mia patrino kaj servas al miaj dioj, kie edzino kaj infanoj min atendas... Ĉu vi akompanos, Anna?

— Jes, frato, se... se...

— Se li akompanos, ĉu vi volas diri ke vi opinias tiel? Li akompanos vin, Anna, kaj mi mem gvidos lin al la altaro, se vi volas — kaj li?

Sigismund forlasis la urbon, surŝipiĝis sur ŝipo, kiu intencas iri al Stockholm.

Sigismund staris kun sia fratino kaj Gustav Brahe sur la ferdeko kiam la ŝipo elglitis sur la golfo Slätbaken. La direktisto estis turnonta norden, al Stockholm, do la reĝo ordonis: Plenan sudan direktion! — Suden! La ŝipo turnis suden je la mirego de ĉiuj kaj ĝojige al la plej multaj.

Inter plej ĉarmaj insuletoj la vojaĝo pasis en sunbrilo sur blua akvo, dum la reĝo salutis la bordon apenaŭ povante reteni sian kortuŝecon:

Adiaŭ, vi bela lando, la hejmo kaj tomo de mia patro; adiaŭ por eterne; sen maldolĉeco sed ankaŭ sen sopiro!

Esperantigis

John Johansson.



## Gävle Esperantoförening

**Ordinarie månadmöte** avhålls tisdagen den 5 okt. kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

**Konversationskurs**, eller, om vädret tillåter, utflykt i stadens omgivningar, äger rum varje söndag kl. 1/2 11 f. m. Samling vid kafé Esperanto. Obs! För alla medlemmar.

Föreningens **bibliotek** är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.

Läs

## Templaren

Templarordens officiella organ!

**Vaken. Omväxlande.**

Pris pr år Kr. 2:50.

## Esperanto per korrespondens.

En korrespondenskurs i Esperanto, varigenom korrespondensmetodens alla fördelar tillämpats på Esperanto, blir färdig i dagarna. Det blir härigenom möjligt för var och en att **på lediga stunder** lära sig det internationella hjälpspråket.

**Lättfattlig. Grundlig. Intressant.**

**Begär prospekt!** Erhålles mot porto.

R. Pehrsson, 3-23, Gävle.

## Vartför skall Sverige stå efter

de stora länderna i fråga om Esperantos spridning?

Rekvirera propagandabladet och visa **alla** Edra bekanta!

Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1:35, 500 st. 6: — och 1000 st. 10: — allt portofritt från

**Sveda Esperanta Federacio, Gävle.**

De som önska adresser till utländska, resp. utomeuropeiska esperantister torde med bifogande av svarsporto vända sig till Fröken **ESTER BECKMAN**, Skara.

**HERRAR**  
EKIPERA SIG BÄST OCH  
FULLSTÄNDIGAST HOS  
**Axel Lidholm**  
Drottninggatan 30 -:- GEFLE

**Kiam** vi bezonas  
viandon, mendu  
ĉe  
**FRANS A. OLSON**  
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

**"LA ESPERO"**  
Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.  
Lösnummer av tidningen kunna för spridning i propagandasäfte erhållas gratis av intresserade.  
Tillskriv **La Esperos expedition, Gävle.**

**Josef Wikströms**  
Tobakshandel  
GEVALIAPALATSET - GEFLE

**Central- och Jernvägshotellen**  
GEFLE  
**REKOMMENDERAS!**

Glöm ej!  
**Café "Esperanto"**  
under sommarmånaderna.

**SKODON**  
Största sortiment hos  
**A. M. Zimmerman & Co**

**C. J. LINDH**  
BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR  
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE  
Rekommenderar sig vid behov av  
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.  
RIKSTELEFON 16 97.

**ESPERANTISTER!**  
*Köp och drick den verkligt goda njutnings- och sällskapsdrycken*  
**ESPERANTO PUNĈO**  
Alkoholfri.  
REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,  
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.



**LA NOVA TESTAMENTO**  
LEDA BINDO  
Kr. 2: 50 (+ porto 0:30 kr.)  
»La Esperos» Expedition,  
GEFLE

**Carl Larssons**  
FOTOGRAFIATELIER  
NYGATAN 34  
**Rekommenderas!**  
TELEFON 357

# La Espero

utgives av Gefle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.  
Lösnummerpris 10 öre.  
Prenumerationspris Kr. 1:20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, **Gefle**, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

**Wickmans Kappaffär**  
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE  
Vid Rådhusplanaden.  
*Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.*  
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.  
**RIKSTELEFON 1391.**

**Gust. Holms Förstoringsanstalt**  
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 1628.  
Faras pligrandigojn laŭ fotografaĵoj.  
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

**N. Lundgren**  
GEFLE - Interurba tel. 151  
**Kamentuboj por fabrikoj.**  
Pli ol 800 konstruitaj.  
Riparoj dum uzado.  
Fulmkonduktiloj estas muntataj.  
Propra brikejo en Upsala.  
Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.  
Argenta medalo en Stockholm 1897  
» » » Gefle 1901  
» » » Norrköping 1906



Från "La Esperos" Expedition, Gefle,  
kan rekvireras utkommen literatur m. m.  
Å lager finnas **Läroböcker:**

Lärobok i Esperanto av  
P. Nylén..... 1: — + porto 0: 12  
Lärobok i Esperanto av  
G. H. Backman..... 1: — + » 0: 16  
Lärobok i Esperanto av  
Carl Ohlsson ..... 0: 50 + » 0: 08  
(Alla med Esp.-svensk ordlista)  
Esperantospråklära av  
O. W. Hjartstätt ... 0: 40 + porto 0: 08  
Esp.-svensk ordbok av  
P. Ahlberg ..... 1: 75 + » 0: 16  
Svensk-esp. ordbok av  
E. L-son Finn ..... 1: 50 + » 0: 12  
Esp.-svensk o. Svensk-  
esp. ordbok av Hjart-  
stätt ..... 0: 60 + » 0: 08  
Unua Legolibro av Dr.  
Kabe ..... 1: 60 + » 0: 12  
**Nova Testamento**  
(mjukt band) ..... 2: 50 + » 0: 30  
**"La Espero"** oficiala  
himno esperantista,  
med musik ..... 0: 60 + » 0: 04

Sveda Kantaro, kun melodioj ..... 0: 35 + » 0: 08  
Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04  
D:o d:o, propagandablad 0: 05 + » 0: 04

Esperantostjärnor ..... 0: 75 + » 0: 10  
D:o, (officiella, för medlemmar av U. E. A.) 1: — + » 0: 10  
D:o, (miniatyr) ..... 0: 35 + » 0: 10  
Esperantobordslaggor 2: 40 + » 0: 30  
D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30  
D:o (mindre) ..... 0: 85 + » 0: 30  
Esperantoflagga ..... 0: 50 + » 0: 08  
D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04  
Reklammarken, 25 st. 0: 45 + » 0: 04

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50  
" d:o, d:o, herrformat 1: 65  
Esperantocopiepenner, 30 öre st., 3: — kr. dussin (hårda eller lösa).  
Esperantoblyertspenner, 10 öre st., 1: — kr. duss. (hårda eller lösa).  
Allt franco.  
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

**E. Liljemarks**  
Cigarr- och Tobakshandel  
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26  
**rekommenderas!**  
Prima varor till billigaste priser.